



monda solidareco

N-ro 111 - Oktobro 2014 - kvaronjara - 1.25 €

La tago de Homo

Albert Camus kiel vivfonto

Filozofa, ĵurnalisto kaj verkisto, Albert Camus estas konata en la literaturaj medioj pro verkaro subite interrompita kiam li mortis en trafikakcidento, en 1960. Li ĵus 46jariĝis kaj lia verkaro jam estis grandega, rekompencita per la Literatura Nobel-Premio en 1957.

Albert Camus 100-jariĝus la 7an de novembro 2013, kaj laŭlonge de tiu jubilea jaro la gazetaro raportis pri diversaj ekspozicioj kaj manifestacioj foje vantante la universalecan homon, kiu li estis, la „civitanon de la mondo“. Albert Camus partoprenis en ĉiuj grandaj luktoj de sia epoko : li defendis la pensliberon, kontraŭis la mortpunon, la torturon, li konsideris sian landon el vidpunkto de civilizacio de integriĝo : iu Francio akceptema al ĉiuj siaj diversecoj, sed Francio integrita en paciĝinta Eŭropo, kaj en unuiganta Mondo.

La 14-an de januaro 2014 en la Senatejo de la Franca Respubliko, nia amiko kaj Senetano Joël Labbé invitis nin omaĝi Albert Camus kiel *pioniron de la monda demokratio*. Monda Solidareco kontraŭ la Malsato estis partnero de tiu evento aranĝita de la Mondcivitana Asembleo : modesta ekspozicio kaj sinsekvo de rimarkindaj prelegantoj reliefigis la tutmondistan memdevontigon de Albert Camus, kiam sine de la Homa Fronto de la Mondcivitanoj li subtenis la agadon de Gary Davis kaj skribis en tio, kio historie restas la « Deklaracio de Orano » sian malaprobos de la militaj kaj dividaj potencoj, kaj en kiu li anoncis nepre la kapablon de la popolaraj amasoj kunvenigi Asembleon reprezentan de la Popoloj por starigi mondon kun paco kaj civilizacio « *car nenio malplia povas utili al ni* ». Kaj en tiu spirito Guy Aurenche, honora advokato kaj mondcivitano, konkludis sian propran paroladon per tiu konvinko : « *Vi estas, ni estas la konstruantoj, la vekantoj de la tago de Homo* ».



Enhavo

Albert Camus, kiel vivfonto	p. 1
Starume en Kaŝuŝa,	p. 2
Retroen pri Gicije.....	p. 3
Raporto de misio en Gicije.....	p. 4
Okcidentafrika Asembleo.....	p. 5
La vojoj de solidareco.....	p. 6
El la Administra Konsilantaro.....	p. 7
Fotoj ... kaj kotizoj !!	p. 8

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato fontas el tiu folozofio : ni ne atendu, ke iuj aliaj anstataŭ ni konstruos la mondon en kiu ni deziras vivi : se ni volas mondon kun solidareco, ni mem konstruu tiun solidarecon trans ĉiaj limoj kaj diversecoj, kaj ke nia agado fundamentita sur malferma kaj nepre respektema homeco estu lumo por ĉiuj.

Daniel Durand

NB. Le compte-rendu de la journée du 14 janvier est disponible par ce lien :

<http://www.recim.org/ascop/pr28-fr.htm>

ou sous forme d'une brochure que l'on peut obtenir sur simple demande à l'adresse du bulletin

En Kaŝuŝa, ĉu necesas permeso por stariĝi ?

Arestita dimanĉe la 24an de aŭgusto, Aimé Ruzuba Bisimwa, animanto de « Monda Solidareco – Kune Agadi » estis malliberigita en la karcero kaj poste en la centra malliberejo de Bukavu ĝis la 13a de septembro.



Kio okazis ?

Aimé Ruzuba Bisimwa estas aparte aktiva de post 2006 en Kaŝuŝa, norde de Bukavu, apud la lago Kivu. Ekde 1994, « mondcivitana teritorio » de 2006, Kaŝuŝa estas vilaĝaro sine de la administra teritorio Kabare, kiu estas entenata en la Landa Parko de Kahuzi-Biega, agnoskita de UNESKO kiel « situo de monda heredaĵo de homaro »

Kolego de Aimé atestis, ke la kialo de la arestado de Aimé estis la aranĝado de la Kaŝuŝaj vilaĝoj kiel vera urbo. Ĉar tiu projekto bone evoluis kaj la petoj venantaj de Bukavu multiĝis, kelkaj provincaj aŭtoritatoj opiniis, ke tiu projekto starigita de memvolaj civitanoj, konsistigis malhelpon al iliaj propraj projektoj : « ribelo ». Aimé estas persekutata pro tiu projekto, sed la akuzoj estas fabrikitaj : friponado, uzurpado de povo kaj ribelo ! Plurfoje la asocio skribis al la aŭtoritatoj por peti ilian partoprenon laŭ la konvencio de la urboj de la Monda Heredaĵo de UNESKO, sed neniu prikonsentis. Nun tio fariĝas « ribelo, uzurpado de povo kaj ofendego al aŭtoritato ».

Aimé Ruzuba Bisimwa estas la prezidanto de la asocio « Monda Solidareco – Kune Agadi » MSKA/SMAE (elvokita en la artikolo) estas korespondanto de MSM en Sud-Kivuto, iniciatinto de la fiŝbreda kaj birdobreda projekto en Cifunzi, financita de MSM en 2004. Ĝi havas la projekton de fondado de Pluzorga kaj Kunordiga Buroo, kiu ampleksos ambaŭ Kivutojn, Ruandon kaj Burundion – projekto nun prokrastita.

SMAE kondukis ankaŭ aliajn evoluoperaciojn, interalie pri teknika konsilado kaj pri elektroprovizado de vilaĝoj (Butwashenge, Kasheke, k.a.)

La akuzoj celas ne nur la projekton de plibonigado de la vivkondiĉoj en Kaŝuŝa, sed ankaŭ la spiriton, kiu instigis al la transformado de la lokoj kaj kondutoj. La familio kaj amikoj de Aimé kalkulas do, nature, kun la organizaĵoj al kiuj la vilaĝaro de Kaŝuŝa estas ligita por subteni lian defendon.

La 7an de septembro, la Federacia Administra Konsilantaro de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato voĉdonis subtenan rezolucion petantan, ke tiu afero ricevu traktadon konforman al la reguloj entenataj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Subtenkomitato estas tiel konsistigita el pluraj civitanaj organizaĵoj.

Aimé Ruzuba Bisimwa, provizore libera, petas, ke la subteno, pri kiu li profitis dum sia mallibereco ne malstreĉiĝu : la kontraŭuloj ĉeestas.

Ĉu okazos justica proceso ?

Daniel Durand

Retroen pri projekto : **GICIJE** (Ĵomba)


En aprilo 2012, pro siaj aktivecoj por la Civitanoj de la Mondo, Daniel kaj Odile Durand veturis al Ruando kaj Kongio (Norda kaj Suda Kivuto), kie ili renkontis plurajn animantojn de projektoj pristuditaj aŭ subtenitaj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato. Pri tio raportis la bulteno n-ro 108, p. 2 ĝis 6.

En Ruando iu projekto aparte kortuŝis nin : tiu de Gicije. Dum Monda Solidareco kontraŭ la Malsato apenaŭ ekpaŝis : ne pli ol du cent membroj en Francio kaj kelkaj membroj izolitaj en deko da Afrikaj kaj latin-indiaj Amerikaj landoj, el Gicije resonis la eĥo, kiun ni atendis : **“Kiam la**

kamparanoj komprenis, ke k v a n k a m izolitaj kaj senhavaj ili povos helpi a l i a j n kamparanojn, interalie en latina Ameriko, per sia propra evoluo kaj sia partopreno en tiu transnacia mutualo, tiam ili opiniis tion sensacia ...”

Tiel atestis Michel kaj Annick Dima dum sia restado en La

Lambertie en julio 1984.



La Gicijea projekto estis kondukita en partnereco kun « Kamparanaj Familiaj Domoj » franca organizaĵo (Maisons Familiales Rurales - MFR)

por edukado per praktiko de alterneco. Komence de la 80-aj jaroj, la Ruandaj aŭtoritatoj subskribis interkonsenton kun MFR por ke ĉiu komunumo posedu centron por la alterneca klerigo de plenkreskuloj. En Rubare, montara vilaĝo dependanta de Gicije, la enloĝantaro deziris tie konstrui kroman centron filian de tiu en Gicije mem pro la malproksimeco je pli ol trihora piedirado. Tiu projekto de kroma klerigejo estis kondukita de Michel Dima en respekto al la mutualistaj kondiĉoj de MSM. La loka responsanto de la projekto estis S-ro Casimir Abanganyigabo ; **161 homoj el Rubare tiam aliĝis al MSM.** La projekto estis realigita, la



kondiĉoj de la solidareca kontrakto estis respektitaj kaj la Ruandaj aŭtoritatoj postenigis tien du konstantajn klerigantojn. Ĉio okazis antaŭ la teruraj eventoj de 1994. Kio restas nun ? Jen la misio konfidita al Bartolomeo, mondcivitana responsanto en Kigali, kaj al Aimé Ruzuba Bisimwa, prezidanto de „Monda Solidareco – Kune Agadi“ en Sud-Kivuto.

Misio realigita en septembro 2013.

Raporto de misio

Hieraŭ, ĵaude la 19an de septembro 2013, ni uzis bus-taksion de Kigalio la Ruanda ĉefurbo cele de Gicije en distrikto Njabihu, norde de la lando. Mi kaj Bartolomeo atingis Muzanze (Ruhengeri) je 10a h. De tie ni uzis duan bus-taksion al Mukamira kiun ni atingis je 11a h. De Mukamira ni uzis trian bus-taksion laŭ la vojo al Kabaja ĝis la komunumdomo de la sektoro Ĵomba (eksa komunumo Gicije) kiun ni atingis je 12a h 30.

Alveninte ni estis akceptitaj de S-ino Nikuze Zephyrine, sekretariino taskita per akceptado, informado, sekretariado kaj kontado de la Ĵombaa sektoro. Tiu ĉi nin aŭsultis kaj kondukis ĉe la Inĝenieron Twizerimana Alphonse, taskita per agrikulturo, bredado kaj kooperativoj. De tiu S-ro ni ricevis la informon : la tiama organizaĵo ja ekzistis kaj estis funkcia antaŭ la milito, sed pro la eventoj de 1994 ĉio malordiĝis : la membroj de la asocio disiĝis, aliaj mortis pro funebraj cirkonstancoj ; ĉiuj, kiuj administris la asocion ekziliĝis kaj neniu scias pri ilia sorto.



Koncerne la asocian havaĵon (konstruaĵoj) restas nur ruinoj, kiujn ni ne povis foti pro pluvego. Tamen post la milito kaj la bataletoj, kiuj daŭris en la norda parto de la lando (1994-1998), kelkaj membroj de la asocio plu vivas kaj reorganizis sin sen eksperimentitaj regantoj). Ili funkcias « sub la arbo » (kiel forlasitaj infanoj) diras la Ing. Twizerimana Alphonse. Ĝis nun ili plu agadas, sed sen iu ajn helpo kaj kulturaj kampojn aŭ bredas brutojn (kapridoj kaj ŝafidoj). La ĉefa grupo troviĝas en Ĵomba, kun filio en Kabaja (ĉiuj en la eksa komunumo Gicije, nun Ĵombaa sektoro). Post nia interparolado kun la Ing. Twizerimana Alphonse, ni opiniis oportune konsulti kelkajn kamparanojn por certigi la informojn ricevitaĵojn ĉe la sektorestroj. Tiuj, kiuj estis konsultitaj, donis al ni la samajn informojn. Eĉ pli ili volis konduki nin ĉe kelkajn regantojn de la asocio, sed pro la atmosferaj kondiĉoj kaj la vesperiĝanta horo, tio ne plus estis ebla. Por renkonti tiujn regantojn, necesis, ke ili estu informitaj multe pli frue, sed ĉar ni ne havis iliajn kontaktojn, tio devis tiel okazi. Je 16a horo ni uzis la bus-taksiojn kaj atingis Kigalion je 20a h 45.

BISIMWA RUZUBA Aimé

Ĝenerala Asembleo de Okcidenta Afriko

*Tiu protokolo devis estis enpresita en la lastan bultenon, Monda Solidareco n° 110.
Eraro nia ŝovigis ĝin inter du foliojn, vi bonvolu senkulpigi nin pri tio.*

Materiale organizita de la du Vagaduguaj Globidaranoj Symphorien Meda kaj Bertrand Kissou, la Ĝenerala Asembleo de Okcidenta Afriko okazis la 14an kaj 15an de novembro en Vagaduguo (Burkinio). Ĝi kunvenigis 18 homojn : la korespondantoj kaj la responsantoj de la Pluzorgaj kaj Kunordigaj Burooj el Benino, Burkinio kaj Togolando ĉeestis same kiel du delegitoj el Sokodeo (Togolando), sep membroj de la Federacia Administra Konsilantaro kaj du Globidaraj observantoj.

La Senegalaj amikoj ne sukcesis veturi tien.

Symphorien Meda konsentis fariĝi la moderiganto de la interŝanĝoj dum Constant Gbeze kaj John Agbeli protokolumis.



Claudine Tournier, Federacia Sekretariino prezentis kaj gratulis ambaŭ elektitojn el Okcidenta Afriko, S-roj Meda kaj Gbeze. Iliaj roloj kaj misioj estis rememorigitaj ; ambaŭ novaj administrantoj koncerte kunlaboros en la okcidentafrika spaco kaj partoprenos en la laboroj de la Federacia Administra Konsilantaro.

Post parolado pri historio de MSM kaj priaj interŝanĝoj, pluraj ideoj estas lanĉitaj, kiuj restas maturataj, starigotaj. La projekto « unu homo, unu pano » celus la antaŭenpuŝon de MSM laŭ pluraj temoj. La operacio « +1 » konsistus en tio, ke ĉiu aliĝinto varbu unu novan ; la verkado de memorigilo kun video omaĝus al la kunfondintoj kaj ebligus dokumentitan kaj allogan prezentadon de MSM.



Poste la diversaj agadraportoj de la Administra Konsilantaro kaj de ĉiu regiono estis prezentitaj, komentitaj, diskutitaj kaj aprobitaj. Tamen post trijara ekzisto de la PKB restas precizigotaj aferoj, interalie :

- Ø la prezentado de la projektoj
- Ø la reglamento de la PKB
- Ø la funkcioj, internaj balotelektoj kaj funkciado de PKB,

Du punktoj aparte atentigis nin :

- Ø la situacio en Sokodeo (meza regiono de Togolando), kie la loka asocio de MSM troviĝas sen responsanto aprobita de la Administra Konsilantaro. La elektita administranto S-ro Gbeze kaj delegacio de la Lomea PKB ricevos mandaton por provi solvi tion.
- Ø La estonta financmaniero de la projektoj, en kiu la koncepto pri subvencio estas forlasita.

La financa impulso por ne komenci projekton sed elvolvi jam praktikitan aktivecon estos « MSM seninteresa kredito 100 % repagebla » kies monsumo varios inter 1 kaj 1.000.000 CFA F laŭ la projekto.

Konsekvence la jaraj kotizoj de la Okcidentafrikaj membroj malpliigos ĝis 2 000 CFA F ekde januaro 2014.

Pri tiu nova funkcionmaniero eblos interŝanĝoj inter la PKB kaj la Administra Konsilantaro.

Rekomendoj estis esprimitaj al la Administra Konsilantaro (cf Monda Solidareco n-ro 110, p.2).

D.Charier laŭ la raporto de J.Agbeli kaj C.Gbeze

La administrantoj kunsidantaj en Konsilantaro la 16an de novembro unuanime salutis la kvaliton de tiu Ĝenerala Asembleo, kaj pro ties materiala organizado kaj pro la trafeco de la paroloj, ĉies aŭskultemo, kaj la konstruiva energio eldonita dum tiuj du tagoj.

La vojoj de la solidareco



pasas tra Burkinio ...

Sababougnouma en Bobodiulaso

La projekto de tiu ina grupo (sapofarado) estis financita en aŭgusto 2014. Ĝi ebligis la aĉeton de

- materialo : tranĉotablo, muldiloj, stampilo, marmitoj, pelvoj, siteloj, pesilo, gasbrulilo
- produktoj : natro, palmoleo, parfumo
- malgrandaj materialoj : gantoj, pagajo, ĉerpiloj
- provizaĵoj por la pakado : kartonoj, veldefermilo

La grupo Sababougnouma volas ampleksi la lokan, eĉ regionan merkaton ofertante bonkvalitajn produktojn.

Tiu projekto kontribuas en la elvolvado de la karitea profesiaro en Burkinio. La burkina kariteaĵo estas ĉefe eksportita kiel krudmaterialo.

... Togolando ...

La grupo FLIFE (Togolando) efektivigis la plenan repagon de la prunto donita de MSM por bredado, kiun ĝi sukcesis bone regi malgraŭ malfacilaĵoj.

Dankon al ĉiuj membroj de FLIFE, kiuj bone komprenis la solidarecan internan ideon de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato : la repagita mono utilos al aliaj grupoj, kiuj atendas sian financadon.

Le grupo FIDES (Togolando) ĵus ricevis financadon por sia kapridbreda projekto ; ni deziras bonan kuraĝon al ĉiuj membroj de la grupo por la sukceso de la starigo kaj de la daŭrigo de sia projekto.

... Kongio.

En Boma, (Malalta Kongo) la pastro Hippolyte Muaka regas la « **Junulhejmon Maria Reĝino de la Koroj** » (FOMARC, laŭ la franca nomo), hejmo, kiu akceptas stratajn infanojn kaj gejunulojn , kaj kiu ne havas aliron al edukado. La asocio FOMARC, membro de MSM petis financadon en 2010 por aranĝi porkobredadon kaj legomkultivadon..

La financado de tiu projekto (10.06 CD) estis voĉdone decidita en marto 2011 kaj la unua financoparto estis pagita en marto 2014.

Fine de aŭgusto, la pastro Hippolyte Muaka skribis : « **ni komencis per la legomkultivado : cepo, ŝenoprazo, pimento ... ĉar la seka sezono estas favora al tiu kultivado.** »

Raporto pri la faritaj laboroj kaj fotoj estas promesitaj.



Dankon kaj brave al la Pluzorgaj kaj Kunordigaj Burooj pro ilia rimarkinda laboro farita ĉe la grupoj, iliaj detalitaj raportoj akurate senditaj por la lasta kunsido de la Administra Konsilantaro la 6an kaj 7an de septembro. La membroj de la Administra Konsilantaro konscias pri la renkontitaj malfacilaĵoj, aprezas ilian sindediĉon, et renovigas sian subtenon.

Claudine

La Administra Konsilantaro kunvenis la 16an de novembro 2013 en Vagaduguo (Burkinio) kie estis esploritaj la rekomendoj de la Okcidentafrika Ĝenerala Asembleo (cf. Monda Solidareco n-ro 110). Poste ĝi kunvenis la 22an kaj 23an de februaro 2014 en Saint-Georges les Baillargeaux, la 9an kaj 10an de majo en Gemeaux (kun la partopreno de Symphorien Meda, administranto, elektita delegito el Okcidenta Afriko, per Skajpo) kaj la 6an kaj 7an de septembro en Niort.

Funkciado de MSM :

- Ä La 6an de septembro 2014, la Federacia Estraro estis reelektita, nome Claudine Tournier kiel federacia sekretariino, Edwige Geniteau kaj Danièle Charier, adjunktaj federaciaj sekretariinoj, Daniel Durand kasisto.
- Ä Koncerne la aferon kontraŭ Dramane Traore (ADRI) estas malmulte da novaĵoj pro la nuna feriado de la justicaj instancoj en Burkinio. Tio sendube evoluos dum oktobro. Male la AK havas neniun informon pri tiu koncernanta Yaovi Kuadjo (APGA) : la advokato Mastro Lawson-Banku ne respondis al la retmesaĝoj. Nia konflikta servo transprenos la aferon kaj la ambasadejo de Francio en Togolando estos informita.
- Ä Constant Gbeze, administranto, elektita delegito de Okcidenta Afriko, ne kapablis, pro malbonfarto, veturi al Sokodeo por klarigi la tiean situacion.
- Ä La AK subskribis subtenleteron al Aimé Ruzuba Bisimwa, membro de MSM, kiu iniciatis plurajn evoluprojektojn en Sud-Kivuto (Kongio), malliberigita pro tiuj projektoj, kiuj ĝenas tiujn de kelkaj politikuloj. Poste li estis liberigita.
- Ä La administrantoj atentis pri la evoluo de la epidemio de Ebola viruso.
- Ä La AK salutas la kunlaboradon starigitan de John Agbeli kaj Symphorien Médä inter iu togolanda NRO kaj la grupo Gnoulamon el Burkinio, kiu transformas la nutroproduktajn por ties konservado.
- Ä La administra Globidar-retejo estas fondita. La administrantoj nun devas provizi ĝin per siaj dosieraj informoj. Ili devas ankaŭ provizi la publikan retejon sendante la elementojn al John De La Cruz.

La projektoj :

- F La **abelbredistoj de Sanantonio Palopo** en Gvatemalo ricevis la financadon por sia projekto de abelujaro.
- F La solidareca kontrakto inter MSM kaj la asocio **FOMARC** en Kongio estas subskribita kaj la unua financoparto pagita por la projekto de legomkultivado kaj de porkobredado.
- F La grupo **FIDES** (Togolando) ricevis la unua financoparton de sia projekto de komercigo de maizo kaj oleo.
- F En Burkinio, ankaŭ la grupo **Sababougouma** ricevis la financadon, kiu ebligas la fabrikadon de sapoj.

Animado :

- Ä MSM estis partnero de la omaĝo farita al Albert Camus, la 14an de januaro 2014 en la franca Senatejo en Parizo.
- Ä MSM pretigas ekspozicion de akvareloj de Nadine Dieulefit kaj de skulptaĵoj de Abdoulaye Gandéma kaj Fodé Bayo en Poitiers de la 18a ĝis la 26a de oktobro. 10 % de la vendosumoj estos repigitaj al MSM.

La estontaj kunsidoj de la Administra Konsilantaro okazos la 6an kaj 7an de decembro en Nouaillé-Maupertuis, la 7an kaj 8an de marto 2015 en Braye-sous-Faye (aŭ Saint-Georges les Baillargeaux), la 13an kaj 14an de junio en Saint-Aubin de Luigné kaj la 12an kaj 13an de septembro en Niort.



Symphorien Méda kaj Constant Gbezé

Bakary Ouattara



Hortense Napo Gnonka kaj Claudine Tournier

Danièle Charier kaj Donko Massimayelé



Georgette Laté

Daniel Durand
Symphorien Méda
kaj Jean Anato



Monda solidareco

estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

- Ø Aliĝiloj
 - Ø Flugfolioj pri projektoj
 - Ø Pliajn bultenojn
 - Ø Federacia Reglamenta de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
 - Ø Afişetoj (A3-formato)
- Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

Nur por Eŭropo :

- Ø Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikotĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Ø Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Ø Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

Āper franca ĉeko al **Globidar**

Āper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
SMF- MONDA SOLIDARECO
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056

Ā per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo www.globidar.org

Ā ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

ĀFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Majo 2014	1 427 €
Junio 2014	4 383 €
Julio 2014	758 €
Aŭgusto 2014	557 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Redakcia komitato : Claudine Tournier, Danièle Charier, Daniel kaj Odile Durand, John De La Cruz Edwige Geniteau,

Fotoj el la fototeko de MSM

Emblemo : Yamsina Sahraoui
Elfrancisgis Daniel Durand,
Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75

info@globidar.org

www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE

Francio